

& Dektria numero:

< Rekante 29 el 59 batoj por strofo, entute 649 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:59> (

/mi re rere do dodo re rere mi mi;mi so soso la soso fa mi; mi re rere do dodo re rere mi mi;mi so soso la soso fa mi;

(#Rekantaĵe: mimi rere do dodo dodo redo mi mi; soso soso la so fa mi; mimi rere do do dodo redo mi mi; soso soso la so fa mi i)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 Li estas krimulo!... Mallevis li kapon, ; Pri vivo pasinta pensante, ; Malsupren al brovoj surŝovis li ĉapon, ; Kaj iras, per ĉenoj sonante.

(×: **Vidu, suno levos tuj sin por nova tago ; kaj ne zorgas niajn agojn ; kaj ĝi superpasos nin ĝis la vespero ; dum klopodas ni sur tero.**)

'2 Vi pensas kredeble, ke estas li homo? ; Ho, vane! ĝi estas malvero: ; Li estas nur ia vivaĵo sen nomo, ; Cifero, "dektria numero".

'3 Piedojn kaj manojn katenoj turmentas, ; Animon plenigas doloro, ; En korpo malsana malvarmon li sentas, ; Sopiron grandegan en koro.

'4 Li forte laciĝis, Ripozu li volas, ; Kaj jen li sidiĝas sur tero. ; "He, vi!... sonas krio: vi ree petolas?! ; Vin levu, "dektria numero"!

'5 Kaj ree li paŝas, per ĉenoj sonante, ; Kaj ree sopiras sen fino, ; Pri celo de sia vojaĝo pensante, ; Pri domo, infanoj, edzino.

'6 Rapide traflugas en lia memoro ; Pentraĵoj de vivo mizera. ; Kaj ree en korpon penetras doloro, ; en koron - turmenta infera!

'7 En malliberejo malluma, malpura, ; Senkulpe ŝlosita li estis, - ; Kaj tie en stato malbona, terura ; Kvin jarojn longegajn li restis!

'8 Li jam humiliĝis al juĝo malvera, ; Kaj nur liberiĝon avidis, - ; Sed vane: subite lin sorto severa ; Denove krulee jeridis.

'9 En malliberejo fariĝis ribelo, - ; Al ĝi ankaŭ lin oni igis. ; Sed oni neniom aliris ol celo, ; Por ĉiam nur sin pereigis.

'10 Kaj jen rezultato! Mallevis li kapon, ; Pri vivo pasinta pensante, ; Malsupren al brovoj surŝovis li ĉapon, ; Kaj paŝas, per ĉenoj sonante.

'11 Vi kredas sendube, ke estas li homo? ; Ne kredu, - ĝi estas malvero: ; Li estas nur ia vivaĵo sen nomo, ; cifero, "dektria numero".)